**81-a Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilo**
**12-15.10. 2023**

Okazis en la tre bela andaluza urbo Sevilo, nomata perlo de Andaluzio. Post Madrido, Barcelono kaj Valencio ĝi estas la kvara plej granda urbo en la lando. Trafluas ĝin la rivero Guadalquivir. Sevilo famas pro flamenko-danco, taŭro-bataloj kaj aliaj tradiciaj festoj. La katedralo de Sevilo estas la tria plej granda en Eŭropo. Imponas ankaŭ la reĝpalaco *Alcázar*, unu el la plej antikva en Eŭropo kaj la plej bela en Hispanio. La majesta katedralo Sankta María 130 metrojn longa kaj 76 metrojn larĝa estas la kvara plej granda en la mondo. La ĉefplaco *Plaza de España* estas belega duoncirkla historia monumento. Alia simbola monumento estas la *Torre del Oro* (Ora Turo), en kiu troviĝas la muzeo pri maraĵoj. En Sevilo oni trovas monumentojn de romiaj, arabaj kaj eŭropaj stiloj, multajn parkojn, muzeojn kaj aliajn belaĵojn. En la urbo moviĝas 99 ĉeval-ĉaroj por promenigi turistojn. Dum la kongreso ne estis multaj eblecoj vidi ĉion vidindan. La sabatan matenon esperantistoj povis viziti la Belartan muzeon. Ĉe la metroo-stacio *Puerta Jeréz* ekstere en la apuda pasejo estis instalita ekspozicio de pentraĵoj de famaj pentristoj el la muzeo de Prado.

La kongresa temo estis: **"Komprenemo inter popoloj".** Pri ĝi amplekse prelegis ĉe la fino de la kongreso la prezidanto de UEA Duncan Charters**.** Al la kongreso aliĝis pli ol cent kvindek geesperantistoj el pli ol dudek landoj. La kongreson partoprenis krom la prezidanto de UEA kun sia edzino ankaŭ la ĝenerala direktoro Martin Shafer kun sia familio. La kongreso okazis en la andaluza sidejo de UGT (ĝenerala unio de laboristoj).

Ĵaŭde, ekde la 10-a horo okazis akcepto de kongresanoj. Ni ricevis sakojn kun la kongresa materialo kaj intertempe oni povis trarigardi la libroservon instalitan en la enirejo. Poste okazis prezentado de la kongreso. Post la tagmanĝa paŭzo sekvis kuvenoj de la hispanaj E-asocioj kaj prezentado de la libro "125 años de Esperanto en Sevilla", (125 jaroj de Esperanto en Sevilo), kiun oni povis aĉeti surloke. En la Vespero okazis festeno kun multaj manĝaĵetoj, dolĉaĵoj kaj trinkaĵoj omaĝe al la 112-a datreveno de la fondiĝo de la esperantista grupo de Sevilo.

La inaŭguro okazis vendrede je la 10-a horo en la salono Zamenhof. La ĉeestaron alparolis salutante Antonio Rodríguez Gasch, José Roldán León (prezidanto de LKK), Ángel Arquillos (prezidanto de HEF), Duncan Charters (prezidanto de UEA), Laŭra Brazabenni (Itala Esperanto Federacio) kaj Rodica Todor (IFEF prezidantino). Sekvis salutoj de aliaj asocioj kaj muzika paŭzo. Poste ni povis spekti filmojn pri Esperanto en Tubaro. Unue Pablo Busto klarigis kiel akiri ilin. Gabriela Manzano kun sia patro Viko prezentis kelkajn amuzaĵojn el "PIKA PIKA ESPERANTO". Aliloke okazis kurso por komencantoj. Sekvis prelego: "Libera kulturo kaj liberaj programoj, ankaŭ en Esperanto", "Instruado de Esperanto en la andaluza publika eduksistemo" al kiu alvenis kelkaj studentoj de la mezlernejo. Poste ni ĝuis teatraĵon "La akuzantivo aŭ la kazo pri malklera tatuisto" prezentita de la "Talenta Teatra Trupo". Sekvis prelego "Deveno de la lingvoj kaj de la lingva diverseco". Akompane de citero ni povis aŭskulti poeziaĵojn prezentitajn de Ana Manera kaj Ángel Arquillos. Pri la spaca programo Artemis kaj reveno al la Luno interese parolis Carlos Spinola. La lasta prelego mallongigita pro manko de tempo temis pri ĉinaj ideogramoj.

Sabate posttagmeze estis prezentita la teatraĵo "La gazetara konferenco" fare de la "Talenta Teatra Trupo". Aliloke okazis ateliero pri Esperanto. Sekvis prelegoj: "Minimumismo bonas" kaj "La bibliotekoj tra la historio". Vespere ni spektis pupteatron kaj grupo de bele vestitaj kastanjet-ludistinoj prezentis belan spektaklon en la ritmo de aldonita muziko.

Dimanĉe matene ni spektis la teatraĵon "La pomo de Adam". Poste okazis aŭkcio gvidata de Tonyo del Barrio. Sekvis prelego de Duncan Charters kaj la oficiala fermo de la kongreso. Dum tiuj tagoj regis varma (eĉ varmega) suna vetero, do multaj plene interesiĝis pri la kongresa programo. Oni povas konstati, ke la kongreso estis sukcesa kaj bonetosa. Koran dankon al la organizantoj pro tiu agrabla evento.

*Liba Gabalda*